

& Kvar jartempoj:

< Rekante 29 el 59 batoj por strofo, entute 472 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Dektria numero.>

(#Melodio:

<:59> (

/mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi; mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi;

(#Rekantaĵe: mimi rere do dodo dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi; mimi rere do do dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi i)

)×8)

+

(&Strofoj:

'1 Ridetas gajege kaj hele naturo: ; Ĝin vestas smeralda verdaĵo, ; Ĉirkaŭe vidiĝas de vivo plezuro ; Kaj ĝojo en ĉiu kreskaĵo.

(×: **Vidu, suno levas nun sin por nova tago ; kaj ne zorgas niajn agojn ; kaj ĝi superpasos nin ĝis la vespero ; dum klopodas ni sur tero.**)

'2 Kaj suno favore, amike etendas ; Al ĉio brilantan radion, ; Al ĉio feliĉon, konsolon ĝi sendas, ; Vivigas, varmigas ĝi ĉion.

'3 Naturo jam estas en luksa disfloro, ; Je vivo matura pleniĝas, ; Kaj suno simila je globo de oro ; En bkluo ĉielo ruliĝas.

'4 Sed ĝi tro varmege bruligas aeron: ; Arbaroj jam pluvon avidas, ; Kaj herbo flaviĝas kaj falas sur teron, ; De suno sin kaŝi rapidas.

'5 Ĉesiĝis jam tute varmego somera, ; Naturo malgaje forfloras, - ; Kaj ofte en sia malĝojo sincera ; Per pluvo senhalta ĝi ploras!

'6 Nur vento ribela, trapike fajfante, ; Ŝancelas foliojn kun bruoj, ; Kaj ilin forpelas, de arboj ŝirante ; Ĉagreno, sopiro, enuo!

'7 Blankiĝas naturo, en neĝo vestita, ; Kaj kiel arĝento ĝi brilas; Per prujno lanuga kaj griza kovrita, ; Ĝi je maljunulo similas.

'8 Sed morto severa vidiĝas en ĉio, - ; Ĝin forta eĉ frost' ne forigas. ; Malvarmo, silento. Kaj suna radio ; Nur lumas, sed jam ne vivigas!